

Johann Wolfgang von Goethe,

Dornrozeto

tradukita de Kálmán Kalocsay

Vidis knab': Jen, juna flor'!
Rozujet' kampara!
Bela, kiel la aŭror'!
Li alkuris ĝoje por
Vidi, kiel kara!
Rozo, rozo, ruĝa roz',
Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,
Rozujet' kampara.
Diris roz': Mi boras vin,
Ĉiam vi memoras min,
Pro l' dolor' amara.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do
De l' rozuj' kampara,
Ĝi, defende, pikis tro!
Sed ne helpis ve kaj ho
Kontraŭ vol' barbara.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
Rozujet' kampara.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.

Johann Wolfgang von Goethe,

La rozeto

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Knabo vidis – jen rozeto
Sur la kampo staras;
Bela, juna la floreto . . .
Vive kuras la knabeto,
Ĝojas, miras, flaras.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros
Belulinon mian »;
Floro diris : « vi foriros, –
Per pikiloj mi disŝiros
Tuj la manon vian ».
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante
La rozeton prenis, –
La floreto batalante
Sin defendis pikadante,
Sed la sorto venis.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhova poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

Johann Wolfgang von Goethe,

Knab' rozeton vidis li

tradukita de Joachim Gießner

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,
vi rozeta floro“.
Diris roz': „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro“.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.